## Aldonaj decidoj faritaj lige al la Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj

Lige al la *Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj*, la Akademio de Esperanto opiniis necesa ŝanĝi antaŭan decidon pri la signifokategorio (karaktero) de la radiko *fiks/*, pliprecizigi antaŭan deklaron pri la dukategorieco de la radiko *fals/* kaj fiksi la signifokategoriojn de la antaŭe ne oficiale enkategoriigitaj radikoj *korupt/* kaj *abstrakt/*. Ĉi tiuj decidoj pri signifokategorioj estas farataj per la jenaj difinoj de ĉi tiuj kvar radikoj kaj la piednotaj klarigoj aldonitaj al tiuj difinoj.

**abstrakt/a.** Apartigita de la reala mondo, pure koncepta: *batalado abstrakta kaj teoria ordinare al nenio kondukas; abstrakta ideo; abstrakta pentroarto.*

**fals/i.** 1. Trompe ŝanĝi ion, igante ĝin malaŭtentika: *falsi dokumenton, la historion; oni poste falsis la sencon de miaj vortoj; la ĵetkuboj estas falsitaj.* 2. Trompe krei ion malaŭtentikan imite al io valora: *falsi oron, monerojn, biletojn, eŭrojn; falsita vino, lakto; oni falsis mian subskribon.* **fals/a.** 1. Malaŭtentika, falsita: *la dokumento povus esti falsa; falsa mono, subskribo, hararo; falsaj atestantoj, profetoj, dioj.* 2. Karakterizata de falsado: *la loko en la famaj Analoj de Tacito, kie temas pri la ekzekuto de Jesuo, certe estas posta falsa intermeto.*[1,2]

**fiks/i.** 1. Firme senmovigi almetante al io: *fiksi flagon ĉe fenestro, ankron ĉe la fundo, tabulon per najloj, najlon en muro, rompitan membron per bandaĝo.* 2. (figure) Igi senmova, senŝanĝa: *la formo de la lingvo estas jam fiksita por ĉiam; fiksi la okulojn; ŝi fiksis scivolan rigardon sur la vizaĝo de Marta.* **fiks/a.** Rilata al fiksado, per fiksado de io: *li fikse rigardi la fajron; kun fiksa rigardo mi ĝin observis.*[3]

**korupt/o.** Socia fenomeno karakterizata unuflanke de politikaj decidantoj influeblaj per monaj aŭ alispecaj donacoj kaj aliflanke de homoj pretaj kaj kapablaj tiel influi la decidantojn: *la korupto estas unu el la plej videblaj malsanoj de nia lando; per ĉi tiu leĝo la registaro celas kontraŭbatali la korupton en la urbaj administrejoj*. **korupt/a**. Subaĉetebla aŭ subaĉetema: *la korupta estro de la firmao dum multaj jaroj influis leĝproponojn per sia subaĉetado de kelkaj koruptaj ministroj*. **korupt/i**. 1. Subaĉeti: *li pagis milionojn por korupti politikistojn*. 2. (evitinde) Igi malvirta aŭ malbonkvalita.

---

1 La radiko *fals/* estas dukategoria, samtempe verba kaj adjektiva radiko. La unua senco de *falsa* estas la adjektivkaraktera senco. La dua senco de *falsa* estas regula derivaĵo de la verbkarakteraj sencoj.
2 Oni evitu uzadon de *falsa* en la senco *malĝusta/malvera* (kiel en "ili kreas falsan imagon pri Esperanto") kaj en la senco *prezentanta la veron mensoge/erare* (kiel en "falsa lango").
3 Oni ne uzu *fiksa* en senco simila al *fiksita*, *firma* aŭ *nemovebla*. La Akademio per ĉi tio nuligas sian antaŭan aserton pri la dukategorieco de *fiks/* el la *Baza Radikaro Oficiala* de 1974.